39

Arbeitspapier Nr. 57

# 4. Werkstattgespräch

| | |
|---|---|
| Interlinguistik | Interlingvistiko |
| in | en |
| Wissenschaft | Scienco |
| und | kaj |
| Bildung | Klerigo |

## 4-a Laborkonferenco

Redaktion: I. Meyer

Paderborn, Februar 1980

Druck: Forschungs- und Entwicklungszentrum für objektivierte Lehr- und Lernverfahren (FEoLL) GmbH

©

ISSN 0344-1032

Der Nachdruck ist bei Quellenangabe gestattet. Nutzung für gewerbliche Zwecke bedarf der Genehmigung.
Represo permesita kun fontindiko. Komerca uzo agnoskenda.

### 3.3.7 La predikativo: Teorio kaj didaktiko por elementlerneja lingvoorientiga instruado

de Fabrizio Pennacchietti kaj Mario Nordio

o. La predikativo estas, kiel konate, la vortfunkcio, per kiu oni atribuas helpe de verbo aŭ kopulo certan kvaliton aŭ oficon al la subjekto aŭ al la objekta komplemento. Sub diversaj formoj povas prezentiĝi la predikativo:

1 - kiel substantivo aŭ substantiva sintagmo,
2 - kiel adjektivo (aŭ adverbo),
3 - kiel infinitivo,
4 - kiel prepozicia sintagmo.

Siavice, la verbo kiu regas predikativon povas aparteni al unu el la sekvantaj klasoj:

(a) la kopulo esti,
(b) la verboj esprimantaj la ekeston de nova kvalito aŭ ofico kiel iĝi, fariĝi, montriĝi, troviĝi,
(c) la verboj esprimantaj la daŭron de certa kvalito aŭ ofico kiel resti, konserviĝi,
(ĉ) la verboj esprimantaj la ŝajnon de certa kvalito aŭ ofico kiel ŝajni, aspekti, aperi, vidiĝi, mieni,
(d) la verboj esprimantaj la opinion aŭ la senton pri la ekzisto de certa kvalito aŭ ofico kiel kredi, juĝi, pensi, opinii, rigardi, senti, trovi, taksi, estimi, memori,
(e) la verboj esprimantaj la certigon pri la ekzisto de certa kvalito aŭ ofico kiel deklari, atesti, proklami, atesti, priskribi,
(f) la verboj esprimantaj la agon per kiu oni ekestigas novan kvaliton kaj oficon kiel nomi, nomuni, elekti, krei, baloti, igi, fari, lasi, kroni, pentri, skulpti, desegni, prezenti k.t.p.

Resume la predikativaj verboj povas esti aŭ netransitivaj, kiel tiuj apartenantaj al la klasoj (a), (b), (c), (ĉ), kaj la pasivaj formoj de la ceteraj verboj supre indikitaj, aŭ transitivaj, kiel la verboj apartenantaj al la klasoj (d), (e), (f).

Krom tio oni devas rimarki ke, interne de la transitivaj verboj predikativaj ekzistas tiuj, kiuj havas agentivan subjekton, nome la verboj de la

0. La predikativo estas, kiel konate, la vortfunkcio, per kiu oni atribuas helpe de verbo aŭ kopulo certan kvaliton aŭ oficon al la subjekto aŭ al la objekta komplemento. Sub diversaj formoj povas prezentiĝi la predikativo :

1 - kiel substantivo aŭ substantiva sintagmo,
2 - kiel adjektivo (aŭ adverbo),
3 - kiel infinitivo,
4 - kiel prepozicia sintagmo.

Siavice, la verbo kiu regas predikativon povas aparteni al unu el la sekvantaj klasoj :

(a) la kopulo <u>esti</u>,
(b) la verboj esprimantaj la ekeston de nova kvalito aŭ ofico kiel <u>iĝi</u>, <u>fariĝi</u>, <u>montriĝi</u>, <u>troviĝi</u>,
(c) la verboj esprimantaj la dauron de certa kvalito aŭ ofico kiel <u>resti</u>, <u>konserviĝi</u>,
(ĉ) la verboj esprimantaj la ŝajnon de certa kvalito aŭ ofico kiel <u>ŝajni</u>, <u>aspekti</u>, <u>aperi</u>, <u>vidiĝi</u>, <u>mieni</u>,
(d) la verboj esprimantaj la opinion aŭ la senton pri la ekzisto de certa kvalito aŭ ofico kiel <u>kredi</u>, <u>juĝi</u>, <u>pensi</u>, <u>opinii</u>, <u>rigardi</u>, <u>senti</u>, <u>trovi</u>, <u>taksi</u>, <u>estimi</u>, <u>memori</u>,
(e) la verboj esprimantaj la certigon pri la ekzisto de certa kvalito aŭ ofico kiel <u>deklari</u>, <u>atesti</u>, <u>proklami</u>, <u>atesti</u>, <u>priskribi</u>,
(f) la verboj esprimantaj la agon per kiu oni ekestigas novan kvaliton kaj oficon kiel <u>nomi</u>, <u>nomuni</u>, <u>elekti</u>, <u>krei</u>, <u>baloti</u>, <u>igi</u>, <u>fari</u>, <u>lasi</u>, <u>kroni</u>, <u>pentri</u>, <u>skulpti</u>, <u>desegni</u>, <u>prezenti</u> k.t.p.

Resume la predikativaj verboj povas esti au <u>netransitivaj</u> , kiel tiuj apartenantaj al la klasoj (a),(b),(c),(ĉ), kaj la pasivaj formoj de la ceteraj verboj supre indikitaj, au <u>transitivaj</u>, kiel la verboj apartenantaj al la klasoj (d),(e),(f).

Krom tio oni devas rimarki ke, interne de la <u>transitivaj</u> verboj predikativaj ekzistas tiuj , kiuj havas <u>agentivan subjekton</u> , nome la verboj de la klasoj (e)(f), kaj tiuj, kiuj havas <u>ricevecan subjekton</u>, t.e. subjekto , kiu ricevas senton aŭ impreson rilate ies kvaliton aŭ oficon, nome la verboj de la klaso (d). Flanke de tiuj ĉi lastaj

necesas fine meti la verbon havi kiu aperas en esprimoj kiel Karlo havis la manojn malpuraj, ĉar la subjekto de tiu ĉi verbo, kiu mankas al la plej-parto de la etnaj lingvoj, ja ne estas agentiva, sed , lau la difino de Fillmore, dativa.

La supre donita, apenaŭ skizita bildo pri la cirkonstancoj, en kiuj aperas kaj efektiviĝas la predikativo, jam montras la komplikitecon de tiu ĉi lingva funkcio.

Tiu ĉi impreso fariĝas pli akra se ni ekzamenas la manieron, en kiu, ĉe la diversaj lingvoj, la predikativo estas esprimata.

Ni komencu per Esperanto kaj ni limiĝu al la predikativoj esprimataj per adjektivoj kaj substantivoj, ekzemple :

(a) 1 - la domo estas blanka
  2 - Karlo estas kuracisto
(b) 1 - la knabo fariĝis silenta
  2 - la knabo fariĝis viro
(c) 1 - la situacio restis stabila
  2 - ĝibulo ĝis morto restos ĝibulo
(ĉ) 1 - (al Karlo) ŝi ŝajnis sincera
  2 - (al Karlo) tio ŝajnis oro
(d) 1 - Karlo kredis ŝin sincera [= laŭ Karlo ŝi estis sincera]
  2 - li sentas sin heroo [= laŭ li li estas heroo]
(e) 1 - Karlo deklaris sin senkulpa
  2 - Karlo deklaris sin mondcivitano
(f) 1 - tiu laboro igis min laca
  2 - la popolo faris lin reĝo
(g) Karlo havis la manojn malpuraj
(ĝ) Karlo naĝis senvesta

Kiel oni vidas en Esperanto la predikativo estas ĉiam indikata kun granda kohereco per finaĵo nula , do per nul-morfemo kaj tio okazigas kontraston kun la akuzativa morfemo -n , kiu markas la objektan komplementon, al kiu, ĉe la transitivaj verboj predikativaj, la predikativo atribuas certan kvaliton aŭ oficon.

Sed Esperanto estas lingvo forme ege klara. Se ni pasas al lingvoj kiel la latina aŭ la greka, ni rimarkas , ke la predikativo ricevas la nominativan kazon nur kun la kopuloj kaj la netransitivaj aŭ pasivaj verboj predikativaj, ekz.:

Romulus fuit rex "Romulo estis reĝo"
Romulus permansit rex "Romulo longe restis reĝo"
Romulus creatus est rex "Romulo estis farita reĝo"

En la aliaj okazoj, t.e. regate de transitivaj verboj, la predikativo staras en akuzativo, ekz. :

Mesopotamiam fertilem efficit Euphrates "La rivero Eŭfrato faras Mezopotamion fruktodona"
Romani creaverunt Romulum regem "la romanoj faris Romulon reĝo"

En la araba, kontraŭe, la predikativo staras en nominativo nur se ne aperas verba kopulo. Fakte, se verba kopulo aŭ alia verbo transitiva aŭ netransitiva prezentiĝas, la predikativo staras en akuzativo kiel la objekta komplemento, ekz.:

Aḥmad ʒarabī miṣrī "Ahmed estas egipta arabo"

Kāna Aḥmad ʒarabīyan miṣrīyan "Ahmed estis egipta arabo"

Inna Aḥmad yaʒuddu nafsa-hu ʒarabīyan miṣrīyan "Ahmed konsideras sin mem egipta arabo".

En la rusa, same, la predikativo staras en nominativo kiam mankas verba kopulo, ekz.:

Ivan vysokij "Ivan estas alta"
Ivan ximik "Ivan estas kemiisto"

Tamen, se la kopulo aperas , la predikativa adjektivo restas en nominativo, dum la predikativa substantivo aŭ substantivsintagmo ekstaras en la instrumentalo, ekz.:

Ivan byl vysokij "Ivan estis alta"
Ivan byl ximikom "Ivan estis kemiisto"
On byl pervym našim ximikom "Li estis nia unua kemiisto"


En la instrumentalo, same kiel en la rusa, ankaŭ en la serbo-kroata staras la predikativo de transitivaj verboj, ekz.:

<u>njegov rad ga je načinio velikim čovekom</u> " lia verko faris lin granda homo"
<u>osećao sam se mirnim</u> "mi sentis min trankvila"
kvankam aliaj solvoj estas eblaj.

1. La problemo estas nun prezenti al lernejaj infanoj aŭ knaboj tiel malsimplan lernaĵon, kiel estas la predikativa funkcio. Kiamaniere proponi kaj prezenti al ilia lingva konscio la esencon de predikativo? Kiamaniere igi ilin distingi inter la objekta akuzativo kaj la predikativa akuzativo de la latina aŭ inter la "instrumenta" instrumentalo ("fari ion <u>per</u> ia ilo") kaj la predikativa instrumentalo de la slavaj lingvoj?

Nia sugesto ĉi-cele estas ke oni devas trovi sistemon por priskribi per konkretaj kaj videblaj bildoj la semantikan strukturon de la predikativaj frazoj , tiel ke ili klare distingiĝu en la konscio de la juna lernanto disde la ne-predikativaj.

Lastatempe ni ellaboris hipotezon, laŭ kiu la gramatikaj morfemoj tiaj, kiaj la kaz-finaĵoj, la verb-finaĵoj, la prepozicioj kaj similaj morfemoj kaj la konjunkcioj kaj subjunkcioj , estas klasigeblaj en kvar ĉefaj klasoj laŭ la kruciĝo de du koordinatoj :



Temas pri la koordinatoj 1) de relativa PEZECO kaj 2) de relativa VARMECO de certa morfemo.

Per tiuj ĉi ec-vortoj oni aludas apartajn semantikajn funkciojn de la morfemoj, ĉar, kiel konate, ĉiu morfemo starigas specifan semantikan kaj sintaksan rilaton inter du vortoj aŭ vortogrupoj (aŭ vortsintagmoj), t.e. la vorto de ĝi markita kaj iu alia.

## 1.1. La opozicio "PEZA:MALPEZA"

Morfemo povas esti difinita PEZA se, antaŭ ĉio, ĝi indikas, ke la vortspeco A de ĝi markita signifas ion (vivanton, objekton, sensaĵon, mensaĵon, agon, staton aŭ alion) troviĝantan aŭ manistestiĝantan en la sama tempo-spaca sfero de io alia signifata de vortspeco B. Ekzemple, la verbaj finaĵoj -as, -is, -os, -us, -u estas difineblaj PEZAJ morfemoj ĉar ili indikas , ke la ago, procezo aŭ stato esprimata de la verbradiko estas nepre samtempa (en la estinteco, nuntempo aŭ estonteco, fakta, ebla aŭ fiktiva) kaj samspaca kun la subjekto. Alivorte, la -as de (1) la knabo kur-as indikas, ke la ago kur-i okazas en la sama spaco kaj en la sama tempo en kiuj situas la subjekto la knabo. Same PEZAJ estas la prepozicioj en, sur, dum, inter kaj tra , ĉar la substantivoj de ili markitaj esprimas la tempan, spacan aŭ pozician dimension, en kiu io alia situas. Ekzemple, la prepozicio en de (2) la knabo kuras en stadiono indikas, ke la "aĵo" esprimata de la vorto stadiono lokigas la kuron de la knabo kaj tial apartenas al la sama tempo-spaca sfero de tiu. Plie, estas PEZAJ ankaŭ la akuzativa finaĵo -n de la objekta komplemento kaj la instrumentala prepozicio per , ĉar kaj la objekto kaj la instrumento de iu ago nepre apartenas al la sama tempo-spaca sfero de la koncerna ago esprimata de transitiva verbo, ekz.: (3) la knabo skribas letero-n kaj (4) la knabo skribas per plumo.

Male , oni difinas MALPEZA la morfemon, kiu, antaŭ ĉio, indikas , ke la vorto A de ĝi markita signifas ion, al kio oni ne povas atribui la trajton de nepra kunekzisto en la sama tempo-spaca sfero kun io alia signifata de vortspeco B, aŭ pri kio oni ne substrekas tiun trajton. Ekzemple, la prepozicio de aparteno de estas MALPEZA ĉar la posedanto de ĝi indikata ne troviĝas nepre

en la sama tempo-spaco de la posedaĵo : (5) la biciklo de Karlo restas lia biciklo ankaŭ se Karlo troviĝas aliloke. Same MALPEZA estas la adjektiva finaĵo -a, ĉar, ekzemple, (6) brusel-a brasiko restas iaspeca brasiko ankaŭ se ĝi ne estas kultivita en la kampoj ĉirkaŭ Bruselo. Ĉiuokaze la finaĵo -a ne reliefigas la kunekziston de la "aĵo" signifata de la vortradiko : ekzistas ja nuanco inter longnaz-a viro kaj viro kun longa nazo, kie la PEZA prepozicio kun substrekas la ĉeeston de longa nazo ĉe iu viro.

Egale MALPEZA estas la adverba finaĵo -e, ĉar per tiu ĉi morfemo oni preterlasas ĉiun konsideron pri la elentuala tempospaca dimensieco de la "aĵo" signifata de la vortradiko. Vidu ekzemple la kontraston inter (7) labori min-e [= labori kiel ministo aŭ ĉe minejo] kaj (8) labori en mino aŭ en minejo [= labori interne de la fermita spaco nomata min(ej)o] kaj inter (9) mi bone troviĝas ĉi-urb-e [ kontraste kun aliloke; ne gravas ĉi-okaze la dimensieco de la urbo] kaj (10) mi delonge loĝas en tiu ĉi urbo [= delonge mi loĝas ie interne de la fermita spaco de tiu ĉi urbo, dimensiece konsiderita].

Estas ankaŭ MALPEZA la morfemo nul (-Ø) de la predikativo, ekzemple en (11) Karlo estas kuracisto-Ø , ĉar per tiu ĉi morfemo oni ne indikas la ĉeeston de alia persono en la sama tempospaco de Karlo [kiel male indikas la PEZAJ morfemoj -n kaj kun respektive en (12) Karlo renkontis kuracisto-n kaj en (13) Karlo parolis kun kuracisto], sed ke Karlo kaj kuracisto koincidas. Ĉiuokaze la nul-morfemo de la predikativo indikas nedimensiecan koincidon de certa kvalito, ofico, persono aŭ "aĵo" kun la subjekto [ekz.: Karlo estas la kuracisto-Ø , pri kiu mi parolis al vi hieraŭ ], dum la morfemo -n de la objekta komplemento indikas eksplicite, ke ekzistas aŭ estas dezirata la kunesto (ne gravas sub kia formo) de certa persono aŭ "aĵo" en la sfero de la subjekto [ekz.: Karlo serĉas kuracisto-n, Karlo antaŭvidas la estonto-n].

## 1.2. La opozicio "VARMA:MALVARMA"

Nu, se la plejparto de la morfemoj povas esti difinitaj laŭ la opozicio "PEZA:MALPEZA" [ekzistas tamen "amfibiaj" morfemoj, kiuj foje estas PEZAJ, foje MALPEZAJ, kiel ekzemple laŭ kaj por en (14) iri laŭ la rivero (peza: konformeco), (15) laŭ Karlo ŝi estas sincera (malpeza:opinio); (16) li vojaĝos

por tri semajnoj (peza:daŭro), (17) mi faras tion por vi (malpeza:benefaktivo)], estas ankaŭ eble ilin difini laŭ la opozicio "VARMA:MALVARMA".

Kiel VARMA estas difinebla ĉiu morfemo, kiu indikas rektan, simplan, senperan rilaton inter iu vorto aŭ vortgrupo B kaj la vorto aŭ vortgrupo A de ĝi markita. Estas ekzemple VARMAJ la verbaj finaĵoj -as,-is,-os,-us,-u kiuj starigas la subjektan rilaton inter substantivo kaj verba radiko, ekz.: (1) la knabo kur-is. Same VARMA estas la nul-morfemo kiu starigas la rilaton inter kopula aŭ transitiva verbo kaj la predikativa komplemento, ekz.: (18) la knabo fariĝis viro-Ø kaj (19) Karlo sin deklaris mondcivitano-Ø . Aliaj VARMAJ morfemoj estas la PEZAJ prepozicioj en,sur,dum,inter, tra,super k.t.p. kaj la MALPEZAJ prepozicioj ĉe,je,al,ĝis, kiuj starigas lokativajn aŭ direktecajn rilatojn, tempajn aŭ spacajn, inter iu verbo kaj la substantivo de ili markita. Krome, estas VARMAJ la adverba finaĵo -e, la korelativaj tabelvortoj, la prepozicioj pro kaj por kaj subjunkcioj kiel ĉar, se, kiel k.t.p.

Estas, kontraŭe, MALVARMAJ la morfemoj , kiuj indikas plimalpli malrektan, malsimplan, peritan rilaton inter iu ajn vorto aŭ vortgrupo B kaj la vorto aŭ la vortgrupo A de ili markitaj. Tiaj estas ekzemple la objekta akuzativa finaĵo -n [la lingvoj kun transitivaj verboj estas tipologie pli "modernaj" kaj "malnaivaj" ol la lingvoj kun nure intransitivaj verboj kaj ergativo; ŝajnas ke la strukturo (3) la knabo skrib-as letero-n estas la rezulto de pratransformo ek de la ergativa strukturo (20) far la knabo skribiĝ-as letero entenanta du VARMAJN morfemojn : far kaj -as]; la adjektiva finaĵo -a [el lingvo-tipologia vidpunkto la lingvoj kun adjektivoj estas pli "progresemaj" ol la lingvoj en kiuj tiu ĉi vortspeco ankoraŭ mankas aŭ estas en embria stadio; krome, ŝajnas ke la adjektivo konsistigas la rezulton de la transformo de VARMAJ rilatoj: ŝiaj okuloj bel-as ⇒ ŝiaj bel-aj okuloj , en Londono estas urbestro ⇒ la london-a urbestro k.t.p.]; la prepozicio kun [kiu implicas sufiĉe komplikajn rilatojn, kiel tiujn de havo, akompano, reciprokeco k.t.p., ekz.: (21) Karlo venis kun granda mantelo, (22) Karlo vojaĝas kun sia edzino, (23) Karlo parolis kun sia advokato]; la prepozicio per [kiu, indikante la instrumenton, implicas la malon de la benefaktiva rilato, ekz.: (24) Karlo skribas per plumo. ⇐


(25) por skribi Karlo uzis plumo-n ⇐ (26) por skribi al Karlo servis plumo; ĉi-lasta strukturo entaenas tri VARMAJN morfemojn : por, al kaj -is]; la movaj prepozicioj de kaj el [kiuj esprimas la ĉeson de lokativa rilato, ekz.:
(27) Karlo descendis de la monto = Karlo antaŭe estis sur la monto, poste li atingis alian lokon]; la genitiva prepozicio de [kiu indikas la transformon de predika apartena rilato, ekz.: (5) la biciklo de Karlo ⇐ (28) Karlo havas biciklo-n ⇐ (29) al Karlo apartenas (/estas) biciklo] kaj ceteraj morfemoj kiel da, pri, ol kaj la rilativa morfemo ki- de kiu, kia, kio, kie.

2. Kadre de tiuj ĉi du opozicioj la morfemoj estas do klasigeblaj en kvar apartaj klasoj, kiuj rezultas el la kruciĝo de la supre menciitaj koordinatoj: ekestos la klaso de la VARMAJ-PEZAJ morfemoj, tiu de la VARMAJ-MALPEZAJ, tiu de la MALVARMAJ-PEZAJ kaj tiu de la MALVARMAJ-MALPEZAJ.


Tiu ĉi klasigo ebligas la pretigon de didaktika kartetaro, kiu konsistigu la kompletan inventaron de la morfemoj de la lingvo, disdividitaj ĉiu laŭ sia klaso.

Ni elpensis enskribi ĉiun unuopan morfemon sur samformataj rektangulaj kartetoj de kvar diversaj koloroj laŭ la kvar diversaj klasoj de la morfemoj. Tiamaniere la VARMAJ morfemoj estas registritaj sur ruĝaj kartetoj se ili estas PEZAJ kaj sur rozkoloraj kartetoj se ili estas MALPEZAJ; analoge, la MALVARMAJ morfemoj estas registritaj sur malhelbluaj kartetoj se ili estas PEZAJ kaj sur ĉielkoloraj kartetoj se ili estas MALPEZAJ.

Por plie diferencigi la kvar diversajn morfemklasojn, ĉiu karteto entenas tri figurojn - triangulon, sagon kaj cirklon - kies relativa pozicio varias de klaso al klaso:
la PEZAJ morfemoj estas enskribitaj interne de cirklo kuŝanta dekstre de triangulo :




dum la MALPEZAJ morfemoj estas enskribitaj interne de cirklo kuŝanta maldekstre de la triangulo :





Fine, la kartetoj,kiuj gastigas la VARMAJN morfemojn,estas karakterizitaj per sago direktiĝanta de la triangulo al la cirklo; dum la kartetoj,kiuj gastigas la MALVARMAJN morfemojn karakteriziĝas per sago direktiĝanta de la cirklo al la triangulo. La didaktikaj kartetoj respondantaj al la kvar morfemaj klasoj aspektas do jene:


MALPEZAJ - VARMAJ





PEZAJ - VARMAJ




MALPEZAJ -MALVARMAJ





PEZAJ - MALVARMAJ




La du flavaj strietoj ĉe la malsupra rando de ĉiu karteto sub la geometriaj figuroj indikas la respektive lokon, kie oni devas skribi la vorton, vortradikon aŭ vortgrupon markitan de la koncerna morfemo, t.e. sub la

flava strieto respondanta al la cirklo, kaj la lokon, kie oni devas skribi la vorton aŭ vortgrupon, kun kiu la antaŭa estas en rilato, t.e. sub la flava strieto respondanta al la triangulo. Ekzemple, la frazstrukturo de (1) la knabo kur-is estos bildigita de la jena karteto :

[I]





(1) la knabo kur-is

3. Ni vidu nun kiamaniere oni povas utiligi por didaktikaj celoj tiun ĉi kartetaron kaj kiel oni bildigas, ekzemple, la frazstrukturon de frazoj entenantaj predikativon.

Tiaj frazoj, oni scias, havas bazan strukturon pli ampleksan ol tiu de la frazo (1). La frazoj kun netransitivaj aŭ kopulaj predikativ-verboj postulas minimume du morfemojn, nome la verban finaĵon (PEZA-VARMA morf.) kaj la nul-morfemo de la predikativo (MALPEZA-VARMA morf.), ekz.:
(c-1) la situacio rest-is stabila-Ø . Male, la frazoj kun transitivaj predikativ-verboj postulas almenaŭ tri morfemojn, nome la du jam menciitajn kaj la objektan akuzativ-finaĵon -n (PEZA-MALVARMA morf.), ekz.:
(d-1) Karlo kred-is ŝi-n sincera-Ø.


Pro tio, la bildigo de tiaj frazstrukturoj devas efektiviĝi per minimume du aŭ tri kartetoj, kiel en la subaj ekzemploj :

[II]




(c-1) la situacio rest-is stabila-Ø

[III]





(d-1) Karlo kred-is ŝi-n sincera-∅

Kiel oni vidas, se oni preterlasas la sube skribitajn vortojn, en la bildigo [II] la karteto kun la nul-morfemo -∅ parte kovras la karteton [I], tiel ke, anstataŭ havi unu morfemon kaj la lokon por du "eroj" (la substantiva sintagmo la knabo kaj la verba radiko kur-), ni nun havas du morfemojn kaj la lokon por tri "eroj" (la substantiva sintagmo la situacio, la adjektivo stabila kaj la verba radiko rest-). La sinsekva ordo de tiuj elementoj tute ne respondas al tiu preskribita de la Esperanta sintakso. Tamen la utiligo de tiuj didaktikaj kartetoj ne celas la klarigon de la normala vortordo de la lingvo, sed precipe la bildigon de la semantikaj interrilatoj de la diversaj "eroj" de la frazo.

Tial la bildigo [II] prezentas la bazan semantikan strukturon de ĉiuj frazoj kun kopulo aŭ netransitiva predikativ-verbo, kiel la frazoj (a),(b), (c),(ĉ) kaj (ĝ) listigitaj komence de tiu ĉi artikolo, kaj, analoge, la bildigo [III] prezentas la bazan semantikan strukturon de ĉiuj frazoj kun transitiva predikativ-verbo, kiel la frazoj (d),(e),(f) kaj (g) sampaĝe listigitaj.

Pri la bildigo [III] estas rimarkinde, ke ĝi verŝajne konsistigas la rezulton de la transformo de la frazstrukturo bildigita de [IV] :





(30) laŭ Karlo ŝi est-is sincera-∅

(31) al Karlo ŝi ŝajn-is sincera-∅

En ambaŭ bildigoj la elemento Karlo dominas la tutan frazstrukturon kiel la referenco-punkto de certa impreso. En [IV] tamen Karlo rolas nur kiel la ricevanto de tiu impreso, kiel indikas la MALPEZAJ-VARMAJ prepozicioj laŭ kaj al; dum la subjekto estas ŝi kaj la verbo, konforme al la relativa semantika enhavo de laŭ kaj al, estas est- aŭ ŝajn- . En [III],kontraŭe, Karlo ekrolas kiel subjekto, ŝi fariĝas objekta komplemento, la verboj est- (laŭ) kaj ŝajn- (al) transformiĝas en kred-, sed la predikativo sincera-∅ restas senŝanĝa.


La sama bildigo [IV] povus ankaŭ prezenti la ergativan modelon respondantan al la frazo (f-2) la popolo far-is li-n reĝo-∅, nome la frazon (32) far la popolo li iĝ-is reĝo-∅ :




(32) far la popolo li iĝ-is reĝo-∅

Konparu kun :

[III]





(f-2) la popolo far-is li-n reĝo-Ø

Ambaŭ frazstrukturojn dominas la aganto la popolo : en [IV] ĝi rolas kiel ergativo ("fare de ĝi","kaŭze de ĝi" k.t.p.); en [III] ĝi funkcias male kiel subjekto ; pro tio la subjekto de [IV] en [III] fariĝas objekta komplemento. Nur la malsupra karteto, malgraŭ la diversa subskribita verbradiko, ne ŝanĝiĝas.


Pli gravas,ke la bildigo [IV] helpas kompreni la strukturan parencecon inter frazoj kiel ( ĝ ) Karlo hav-is la manoj-n malpuraj-Ø kaj (33) al Karlo la manoj fariĝ-is malpuraj-Ø. La frazo (33) ŝajnas deveni de la kunfandiĝo de (34) al Karlo estas manoj kun (35) la manoj fariĝ-is malpuraj-Ø :

[V]





(34) al Karlo est-as manoj

[II]




(35) la manoj fariĝ-is malpuraj-Ø


[IV]




(33) al Karlo la manoj fariĝ-is malpuraj-Ø

Kontraŭ , la frazo (g) ŝajnas konstitui la rezulton de certa transformo de la frazstrukturo de (33):

[III]





(g) Karlo hav-is la manoj-n malpuraj-Ø

La elemento Karlo, kiu en (33) rolas kiel nedimensieca lokativo (ne en Karlo aŭ sur Karlo, sed al Karlo aŭ ĉe Karlo), en (g) uzurpas la rolon de

subjekto, tiel ke la subjekto de (33), la manoj, fariĝas en (g) la objekta komplemento. Konsekvenco de tiu uzurpo estas la anstataŭigo de la netransitiva verbo fariĝ- (al) per la transitiva verbo hav-.

Laŭ tiu ĉi hipotezo, ankaŭ la frazo (36) Karlo hav-as manoj-n :

[VI]




(36) Karlo hav-as manoj-n

devenas de la frazstrukturo (34) al Karlo est-as manoj; vidu la bildigon [V]. Ankaŭ en tiu ĉi okazo la nedimensieca lokativo Karlo de [V] uzurpas la rolon de subjekto devigante la veran subjekton manoj ŝanĝiĝi en objektan komplementon. Ĉi-okaze la transitiva verbo hav- anstataŭas la netransitivan est- (al).


4. Dank'al ilia facila movebleco, anstataŭebleco kaj kombinebleco, la kartetoj estas tre efikaj por montri la strukturajn interrilatojn inter unu frazo kaj alia.

Se karteto A troviĝas malsupre de karteto B, tio signifas ke la semantika rilato indikita de B dominas la semantikan rilaton indikitan de A. Ekzemple, la kartetoj,kiuj signalas la subjekton de transitiva verbo (vidu [VI] kaj [III]) kaj la komplementon enkondukitan de far, laŭ kaj al (vidu [V] kaj [IV]), ĉiam dominas alian karteton. Same, la karteto , kiu signalas la subjekton de predikativa verbo netransitiva (vidu [II] kaj [IV]), ĉiam dominas la karteton signalantan la predikativon.

Estas dominantaj ankaŭ la kartetoj signalantaj senmovan lokativon, ekz.: al Karlo kaj ti-e ĉi en la frazoj (34) kaj (37) ti-e ĉi loĝ-as komercisto


(al kaj -e estas MALPEZAJ-VARMAJ morfemoj) kaj en tiu ĉi domo en la frazo (38) Petro loĝ-as en tiu ĉi domo (en estas PEZA-VARMA morf.):

[V]




(37) ti-e ĉi loĝ-as komercisto

[VII]





(38) Petro loĝ-as en tiu ĉi domo

En tiu ĉi okazo la malsupreco de est-as manoj, loĝ-as komercisto kaj Petro loĝ-as simboligas,ke la ekzisto de manoj kaj la loĝado de Petro aŭ de iu komercisto efektiviĝas en la "sfero" ĉirkaŭ certa punkto (tie ĉi kaj Karlo estas rigardataj kiel nedimensiecaj lokativoj) aŭ interne de io dimensia (tiu ĉi domo estas rigardata kiel dimensieca lokativo).


Male, se la lokativo estas mova, ĉu de starto ĉu de celo, la karteto kiu ĝin signalas devas lokiĝi malsupre, ekz.: (39) la knabo ir-is hejm-en, (40) la knabo kur-is en la ĉambro-n, (41) la trajno elir-as el la tunelo :

[II]





(39) la knabo ir-is hejm-en

[VIII]




(40) la knabo kur-is en la ĉambro-n

[IX]





(41) la trajno elir-as el la tunelo

En tiu ĉi okazo la supreco de la knabo ir-is, la knabo kur-is kaj la trajno elir-as simboligas ke la koncerna ago efektiviĝas ekstere (vidu (39) kaj (41)) aŭ unue ekstere kaj poste interne de certa lokativo (vidu (40)).

El la diversaj kombinebloj de la kartetoj ni plu menciu nur la jenajn du: la bildigon, kiu koncernas frazojn kiel (42) la grand-a ŝipo ekvel-as, (43) la ŝipo de la admiralo ekvel-as kaj (44) la ŝipo, ki-u albordiĝ-is, ekvel-as:

[X]





(42) la grand-a ŝipo ekvel-as

(43) la ŝipo de la admiralo ekvel-as

(44) la ŝipo, ki-u albordiĝ-is, ekvel-as

kaj la bildigon kiu koncernas frazojn kiel (22) Karlo vojaĝ-is kun sia edzino, (23) Karlo parol-is kun sia advokato kaj (24) Karlo skrib-is per plumo :

[XI]





(22) Karlo vojaĝ-is kun sia edzino

(23) Karlo parol-is kun sia advokato

(24) Karlo skrib-is per plumo

En la bildigo [X] la karteto kun la morfemoj -a/de/ki- estas metita malsupre de la karteto kun la verba finaĵo -as, ĉar respektive la adjektivo, la genitiva komplemento kaj la rilativa subpropozicio rilatas rekte nur kun la substantivo la ŝipo kaj formas kun ĝi substantivan sintagmon, kiu rolas kiel subjekto de la verbo ekvel-. En la bildigo [XI] male la karteto kun la verbo kaj subjekto estas nur ŝajne en malsupra pozicio kompare kun la karteto kun la prepozicioj kun kaj per, ĉar tiuj ĉi morfemoj subkomprenigas strukturon kun du kunordigitaj frazoj, ekzemple (45) Karlo vojaĝ-is kaj samcirkonstanc-e vojaĝ-is lia edzino, (46) Karlo parol-is al sia advokato kaj samcirkonstanc-e lia advokato parol-is al li, (47) Karlo skrib-is kaj por tio li uz-is plumo-n :

[XII] (45) (46) (47)




(45) Karlo vojaĝ- samcirkonstanc-
(46) Karlo parol- al s.a. samcirkonstanc-
(47) Karlo skrib- tio

lia edzino vojaĝ-
lia advokato parol- al li
Karlo uz- plumo-n

Sur la frazstrukturo [XII] agas specialaj reduktaj reguloj, kiuj forstrekas ĉiun duoblan aperon de la sama ero en la du frazoj (<u>vojaĝ-</u>, <u>-is</u>, <u>parol- al</u>, <u>Karlo</u>) kaj tradukas <u>kaj samcirkonstance</u> per <u>kun</u> kaj <u>kaj por tio uz-</u> per <u>per</u>, tiel ke [XII] transformiĝas en [XI].

5. Krom tiuj ĉi kartetoj, kiuj entenas kaj klasifikas ĉiujn morfemojn de la lingvo por ebligi rapidan kaj efikan bildigon de la semantika strukturo de la frazoj kaj tujan rekonon de la lingvaj funkcioj, nia projekto por didaktika ilaro inkluzivas serion de diversaj kartoj kaj puzloj, kiuj servas por plifaciligi la rekoneblecon de la lingvaj strukturoj.